

Wilhelm Raabe,  
Supertere

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Nun ŝvebas supertere  
La lunoarka bril'.  
Deiĝu de l' sufero  
La kor', de l' maltrankvil'.

Dum la etern' silentas,  
Laŭtegas hom-afer'.  
Sed Dio malatentas  
Kverelon sur la Ter'.

Enpaŝu vi trankvile  
Ennokten, klinu vin!  
Doloron vi humile  
Eltenu. Venos fin'.

Nun sinkas en malhelon  
Vantaĵ' malantaŭ vi.<sup>2</sup>  
Brakumas la ĉielon  
L' animo en ebri'.

*Traduko de la Germana poemo "Das Ewige ist stille" de WILHELM RAABE (\*1831-09-06 – †1910-11-15) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-642-1295 (2012-11-03 15:23:25)*

---

<sup>2</sup>aŭ:  
Vantaĵo for de vi.